# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-03 n-ro 344


# Kataro: enkonduko de minimuma salajro por la laboristoj



Ĝenerala Asembleo de UN urĝas Usonon nuligi embargon kontraŭ Kubo

Bombatako mortigis almenaŭ 8 homojun en orienta Afganio

26 civiluloj mortigitaj en aeratako gvidata de Saud-Arabio en Jemeno

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Kataro: enkonduko de minimuma salajro por la laboristoj
*Kataro organizas la Futbalan Mondpokalon 2022 p. 03*

26 civiluloj mortigitaj en aeratako gvidata de Saud-Arabio en Jemeno
*En la Jemena norda provinco Saada p. 04*

Bombatako mortigis almenaŭ 8 homojn en orienta Afganio
*En la afgania orienta provinco Parwan p. 04*

Ĝenerala Asembleo de UN urĝas Usonon nuligi embargon kontraŭ Kubo
*Ekonomia, komerca kaj financa embargo kontraŭ Kubo, kiu daŭris dum pli ol duonjarcento p. 05*

Pace kaj diplomatie solvi problemon utilas al ĉiuj partioj
*La fina celo de Sud-Koreio estas realigi pacon en la Korea duoninsulo p. 05*

Referendumoj malaltigas vojaĝprezojn
*Ŝanĝiĝoj en la politikaj mapoj ne nur efikas al la vojaĝfluoj, sed ankaŭ al la kostoj p. 06*

*Tai Chi* kun rekapabliga efiko
*Helpa kiel metodo de rekapabligado ĉe pacientoj, kiuj ne volas praktiki tradiciajn ekzercojn p. 07*

La unua betona printita ponto aperis en Nederlando
*Unua en la mondo p. 08*

La robota helpanto de leterportisto
*Teamo konsistanta el homo kaj robota prototipo p. 09*

Hodiaŭe
*William Cullen Bryant, kaj Namibio p. 09*

# Kataro: enkonduko de minimuma salajro por la laboristoj

Kataro, kiu organizas la Futbalan Mondpokalon 2022, estas kritikata pro sia mistraktado de la migrantaj laboristoj. Ĝi enkondukos minimuman salajron por la laboristoj, indikis pasintmerkrede *Qatar News Agency*, la nacia novaĵagentejo.



Neniu detalo pri la sumo de tiu minimuma salajro aŭ pri la ekvalida dato estis provizita, sed tiu anonco estigis pozitivajn reagojn en la sindikataj medioj, kutime kritikaj de la riĉa gasproduktanta emirato. La lando ankaŭ anoncis, ke la emirato subskribis ambaŭflankajn akordojn kun 36 landoj, kun la celo provizi al la laboristoj juran protektadon. Granda parto de la ĉirkaŭ 2 milionoj da fremdaj laboristoj, originas de tiuj landoj.

**Enketo pri la lando**

Tiuj anoncoj intervenas ĵuse antaŭ la komenciĝo ĵaŭdon [02 nov 2017?] de decida kunsido de la Internacia Organizaĵo de Laboro (OIT). Tiu agentejo de Unuiĝintaj Nacioj povus lanĉi oficialan enketon pri la sorto de la migrantaj laboristoj en Kataro.

La Internacia Sindikata Konfederacio (ITUC), pozitive reagis per la voĉo de la ĝenerala sekretario de la sindikato, Sharan Burrow. Ĝi opinias, ke Kataro «tiel lanĉas signon de realaj reformoj, kiuj ebligos ĉesigon de la moderna sklavismo, kaj enmetos la landon sur vojon al respekto pri siaj juraj internaciaj sindevigoj koncerne la laboristajn rajtojn».

Kataro estis plurfoje kulpigita fare de NROj kaj sindikatoj pri la vivkondiĉoj de la laboristoj, aparte sur la konstruejoj de la Mondpokalo, kion ĝi akceptos en 2022.

**La ekscesoj de la Kafalo**

Tiu lando jam alprenis, sub la internacia premo, reformojn destinatajn al plibonigo de la vivkondiĉoj de la migrantaj laboristoj dungitaj sur la konstruejoj de la stadionoj.

En decembro 2016, Kataro anoncis finon de kontestata patrona sistemo, la «Kafalo», konsiderata kiel la kialo de ĉiuj ekscesoj kontraŭ la eksterlandaj laboristoj en tiu lando. Kaŭze de tiu sistemo, ĉiuj eksterlandaj laboristoj devas havi surlokan «patronon» - individuon aŭ entreprenon – kaj akiri ĝian permeson por ŝanĝi la laboron aŭ forlasi la akceptan landon.

La kunsido de la OIT komenciĝos ĵaŭdon [01 nov 2017] en Ĝenevo kaj daŭros ĝis la 9a de novembro. La afero pri Kataro estos ekzamenita ĉirkaŭ la fino de la kunveno.

Neniam Milito Inter Ni

## 26 civiluloj mortigitaj en aeratako gvidata de Saud-Arabio en Jemeno

Loka sekureca oficialulo diris al la novaĵ-agentejo *Xinhua* [新华社 xīnhuáshè], ke almenaŭ 26 civiluloj estis mortigitaj merkrede [01 nov 2017] matene, post kiam aeratako de la koalicio gvidata de Saud-Arabio trafis hotelon en la Jemena norda provinco *Saada* kiu estas sub la regado de ribeluloj.



Kelkdek aliaj estis vunditaj en la aeratako, kiu trafis la hotelon en la populara bazaro *al-Layl* en la distrikto *Sahar* de la provinco.

La oficialulo diris telefone sub kondiĉo de anonimeco, ke la viktimoj estis vendistoj de araba teo, laboristoj kaj butikistoj, kiuj kutime ripozis en la hotelo troviĝanta en la centro de la bazaro.

En marto de 2015, la koalicio gvidata de Saud-Arabio intervenis en la jemenan konflikton por subteni la internacie rekonatan registaron de Prezidento Abd-Rabbu Mansour HADI kontraŭ la ribeluloj de la grupo *Houthi*, kiuj ekokupis la plejparton de la nordaj provincoj, inkluzive de la ĉefurbo Sanao.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

## Bombatako mortigis almenaŭ 8 homojn en orienta Afganio

Afgania televido raportis merkrede [01 nov 2017], ke, laŭ loka oficialulo pri sano, almenaŭ 8 homoj estis mortigitaj kaj 25 aliaj vunditaj tiuvespere en bombatako en la afgania orienta provinco *Parwan*.



La raporto diris, ke la atako okazis je ĉirkaŭ la 19a horo sur ŝoseo en la provinca ĉefurbo *Charikar*. Cisternokamiono estis fajrigita pro la eksplodo, kaj la fajro tuj englutis la preterpasantan aŭtobuson. Almenaŭ 8 homoj estis mortigitaj kaj 25 aliaj vunditaj en la atako.

La vunditoj, kelkaj grave, estis transigitaj al proksima hospitalo. Ankoraŭ neniu grupo deklaris respondecon pri la atako.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## Ĝenerala Asembleo de UN urĝas Usonon nuligi embargon kontraŭ Kubo

La rezolucio refoje petas ĉiujn landojn ne publikigi aŭ efektivigi leĝojn kaj rimedojn pri embargo kontraŭ Kubo, kaj urĝas landojn, kiuj plenumas tiajn leĝojn kaj rimedojn, preni necesajn paŝojn por ilin nuligi.



La 72a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj merkrede [01 nov 2017] adoptis per frakase grandega plimulto rezolucion, urĝante Usonon fini la ekonomian, komercan kaj financan embargon kontraŭ Kubo, kiu daŭris dum pli ol duonjarcento.

Ĉiuj 193 membroŝtatoj de la UN partoprenis en la voĉdono. La rezolucio estis adoptita per 191 voĉoj kontraŭ 2. Usono kaj Israelo donis negativajn voĉojn. La Ĝenerala Asembleo adoptis similajn rezoluciojn en 26 sinsekvaj jaroj.

En la lasta jaro, Usono rompis sian 24-jaran tendencon en voĉdono de la UN per sindeteno anstataŭ voĉo kontraŭ rezolucio vokanta por fino de la komerca embargo kontraŭ Kubo. Usona ambasadoro al la UN Nikki Haley klarigis, ke la Usona flanko ĉi-foje ŝanĝis la sintenon pro la elektiĝo de Donald Trump kiel la nova prezidento kaj ŝi mem kiel la nova ambasadoro al la UN.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

## Pace kaj diplomatie solvi problemon utilas al ĉiuj partioj



Oni raportis, ke la unuan de novembro, kiam la sudkoreia prezidento Moon Jae-in faris paroladon pri regad-principoj en la parlamentejo, li diris, ke la fina celo de Sud-Koreio estas realigi pacon en la Korea duoninsulo. En kia ajn okazo al la duoninsulo ne licas estigi armitan konflikton, kaj sankcioj kaj subpremado estas nenio alia ol rekonduki Nord-Koreion al la tablo, ĉe kiu intertraktado povus esti farata.

Por tio, en la regula gazetara konferenco de la dua de novembro Hua Chunying, proparolistino de la Ĉina Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, komentis: "Ĉinio kaj Sud-Koreio ambaŭ havas komunan komprenon kaj komunajn interesojn en la sennukleigo de la duoninsulo, la defendo de paco kaj stabileco en la duoninsulo kaj la solvo de la duoninsula problemo. Solvi la nuklean problemon de la duoninsulo per pacaj kaj diplomatiaj rimedoj plej utilas al ĉiuj partioj koncernataj kaj ankaŭ konformas al la ĝenerala deziro de la internacia komunumo."

Xiong
Ĉina Radio Internacia

# Referendumoj malaltigas vojaĝprezojn

Ŝanĝiĝoj en la politikaj mapoj ne nur efikas al la vojaĝfluoj, sed ankaŭ al la kostoj.




Kio estas ĝojo por unu homo, tio signifas malĝojon por alia homo: Politikaj ŝanĝiĝoj ofte efikas al vojaĝfluoj - kaj por tio ne nur necesas cirkonstancoj kiuj kaŭzas timon pri korpo, vivo kaj manbagaĝo ĉe vojaĝantoj. Ankaŭ faktoroj kiel la minacanta "Breliro" aŭ la streboj al sendependeco de la katalunoj rapide alportas konsekvencojn por la loka turisma industrio. Tio sendube havas tragikajn efikojn por homoj kiuj vivas per tio, sed tio povas esti samtempe interesa por vojaĝemaj mezeŭropanoj, se tio kondukas al malaltiĝantaj prezoj.

Tiel ekzemple aŭstra interreta platformo por mendi vojaĝojn raportas ke la flugprezoj al la Unuiĝinta Reĝlando (Britio) ekde la "jes"-voto por la eliro el EU falegis. "Nia ekzameno de datumoj montras ke politikaj renversoj kiel la "Breliro" povas havi enormajn efikojn al la vojaĝkonduto", diras direktoro de la portalo: "Ĉe la prezoj por la flugbiletoj ekde la Breliro-voto okazis moviĝoj malsupren kaj feriantoj kaptu la favoron de la tempo kaj havigu al si unu el la favorprezaj flugoj al Britio". Konkrete la analizoj montras ke flugoj de Vieno al Londono fariĝis pli favoraj je 12 procentoj, al Dublino kaj *Cardiff*/Kimrio je 18 procentoj. Aparte malsupreniris la prezoj al la skota Edinburgo, kiuj nuntempe situas 28 procentojn sub la ofertoj antaŭ la referendumo.

Sed ne nur mezeŭropanoj profitas de la pli favoraj prezoj, ankaŭ britoj kiuj ankoraŭfoje ŝatas viziti la ceteran Eŭropon dum ili estas ankoraŭ membroj de EU, povas ĝoji pri la malaltaj tarifoj. Flugoj de Britio al Hamburgo kostas nun 54 procentojn malpli, al Las Palmas kaj Sofio la flugprezoj malaltiĝis je 33 procentoj, kaj ankaŭ Berlino kaj Barcelono estas nun atingeblaj per flugoj kiuj kostas 30 procentojn malpli.

Ĉe la hotelprezoj en Britio montriĝas aliflanke signifaj regionaj diferencoj: Kelkaj celoj estas nun signife malpli kostaj, dum aliaj celoj kostas eĉ iomete pli. Hotelprezoj en Edinburgo, Dublino kaj Londono falis je 11 ĝis 32 procentoj, dum por *Belfast* kaj *Cardiff* la prezoj iomete plialtiĝis.

Ankoraŭ tute freŝa en la kapoj de la vojaĝantoj estas aliflanke la referendumo pri la sendependeco de Katalunio, sed la efikoj pri la turismo ankaŭ jam tie estas klare senteblaj. Reduktiĝis la hotelmendoj en la aŭtonoma regiono je 20 ĝis 30 procentoj. Restas tamen malklare ĉu tiu evoluo kunrilatas kun la referendumo aŭ kun la timo pri pluaj terorismaj atakoj post la atenco de la 17-a de aŭgusto.

Esperanta Retradio



# *Tai Chi* kun rekapabliga efiko

*Tai Chi* [Tajĝiĉuano 太極拳 tàijíquán [tʰaitɕitɕʰyɛn]] povas evidentiĝi helpa kiel metodo de rekapabligado ĉe pacientoj, kiuj ne volas praktiki tradiciajn ekzercojn. Pri la valoro de *Tai Chi* en la kardiologia rekapabligado konvinkas sciencistoj el Bostono. Ili donis la atenton al la fakto, ke pli ol 60 procentoj de pacientoj pro diversaj motivoj rifuzas tradician fizikekzercan rekapabligadon.

Multaj asertas, ke ĝi estas malagrabla, tro malfacila, rekte neplenumebla en ilia sanstato. Tial sciencistoj konkludis, ke *Tai Chi* povas esti bona solvo ĝuste por tiuj pacientoj, ĉar ĝi komenciĝas senstreĉe kaj malrapide. Laŭ la gvidanta la esplorojn prof-ino Elena SALMOIRAGO-BLOTCHER, kiam paciento fariĝas pli memfida eblas ŝanĝi la moviĝoritmon kaj grandigi ĝian intensecon. La projekton partoprenis 29 neaktivaj fizike personoj havantaj meze 68 jarojn, en plimulto suferintaj koratakon aŭ operacion ĉe angioj. Ĉiuj malaprobis tradician rekapabligadon ankaŭ pro aliaj riskofaktoroj kiel la fumado, diabeto, alta kolesterolo, obezeco. Sciencistoj adaptis por ili la pli frue prilaboritan ekzercosesion baze de *Tai Chi* adresitan al pacientoj kun pulmomalsanoj kaj kora subfunkcio.

Parto de ili partoprenis la 12-semajnan programon kun 24 okupoj, parto programon 24-semajnan kun 52 okupoj. Evidentiĝis, ke ĉiuj ĉi okupoj estis sekuraj kaj ne kaŭzis nedezirindajn sekvojn krom ioma muskoldoloro komence de la trejnado. La pacientoj mem ŝatis kaj pretis rekomendi ilin al siaj konatoj. Kvankam laŭ prof-ino SALMOIRAGO-BLOTCHER sole *Tai Chi* ne anstataŭos aliajn elementojn de la tradicia kardiologia rekapabligado, kiel kleriĝo pri riskofaktoroj, dieto, medikamentoj ĝi povas fariĝi ponto al rekapabligado fizike pli intensa.

Pola Retradio



# La unua betona printita ponto aperis en Nederlando

Reprezentantoj de la urbo *Gemert*, kiu situas sud-oriente de Nederlando, okazigis malfermceremonion de la unua en la mondo betona ponto, konstruita per tridimensia printado. Konstruaĵoj de la ponto, konstruita dum tri monatoj konsistas el 800 tavoloj de betono. Aldone dum la konstruado oni uzis ne kutiman betonon, sed specialan firmegan betonon, speciale kreitan por konstrua tridimensia printilo.

"Unu el la avantaĝoj de tia ĉi teknologio, kiu estas tridimensia printado, estas la fakto, ke la printilo metas betonon nur en ekzakte ĝustaj lokoj, kie betono estas necesa" - diras Teo SALET, reprezentanto de la Teknologia Universitato de *Eindhoven*. "Rezulte ni bezonas malpli da konstrumaterialoj, ol kaze de tradicia metodo, kiam kutima betono estas verŝata en antaŭpreparitajn lignajn formojn".

Malgraŭ ke la ponto estas destinita nur por movado de biciklistoj, ĝi kapablas teni pezon de kamiono, kiu havas aldone du tunojn da ŝarĝo.

"Nun ni rigardas en estontecon de konstruteknologioj" - rakontas Marinus ŜIMMEL, la gvidanto de la kompanio BAM Infra: "Ni ekhavis konvinkajn pruvojn, ke por la tridimensia printado oni bezonas malpli da konstrumaterialoj, homfortoj kaj dume ne aperas konstrua rubo".

Ni rimarku, ke la ponto en *Gemert* ne estas entute la unua printita en Nederlando, se temi pri diversaj aliaj konstrumaterialoj. Krome la Nederlanda kompanio MX3D nun "printas" ponton el rustorezista metalo en Amsterdamo.

Kirill NOVIĈENKO
Interalie

# La robota helpanto de leterportisto

*Bad Hersfeld* estas urbo en la germana subŝtato Hesio, kaj tie de tri semajnoj estiĝis nova maniero por liveri poŝtaĵojn tra la stratetoj de ĝia malnova zono: per teamo konsistanta el homo kaj robota prototipo, kiu estis alnomita *"Postbot"*.





La nova "kolego" de la poŝtisto Cindy REXRODT estas flav-nigr-kolora – la koloroj de la koncerna firmao "*Deutsche Post AG*", kiu estas la tutmonde plej granda entrepreno pri poŝto. "Ĝi estas ega mildigo por mi, kaj por mia dorso", tiel ŝi laŭdis la maŝinon.

Per kvar radoj *"Postbot"* sekvas "REXRODT" (35-jaraĝulino) observante distancon je unu metro malantaŭe. Ĝiaj perlumsentiloj nepre celas la kurojn ŝian – ĝiaj mezuroj estis skanitaj kaj konservitaj en la memoro de la roboto, kiu rekonas kaj sekvas nur tiujn.

En tiu eksperimento estas dua funkciulo, kiu per teleregilo pretas reagi al neatenditaj okazoj pri misfunkcio de la poŝta roboto, kiu ĝis nun glate deĵoradis, laŭ asertis la franca firmao kiu respondecas pri tiu teĥnikaĵo.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

---



## William Cullen BRYANT

**William Cullen BRYANT (* la 3-an de novembro 1794 en *Cummington*, Masaĉuseco, † la 12-an de junio 1878 en Novjorko) estis usona verkisto.**

**En Esperanto aperis: *Al akvobirdo*.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

***Canis mesomelas*, Namibio.**

**Vikipedio**